

aprilo 1969

62-a jaro

n-ro 761 (4)

esperanto

oficiala organo de

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176, rotterdam-2, nederlando - red. v. sadler



**HOTELO HILTON EN PORTLAND
OREGON – KONGRESEJO 1972**

Vi trovos

sendube, ke via revuo iom perdis sian ekvilibron ĉi-monate. Kaj vi pravos. Dediĉi preskaŭ tutan numeron al unu temo, kiel ni tion faris en marto, signifas ĉiam, ke amasiĝas la regulaj materialoj nepre publikigendaj: informoj de CED, recenzoj, leteroj de legantoj, statistikoj, nekrologoj ktp., ktp.

Tamen ni sukcesis enpremi en du paĝojn (63-64) urbon de 400 000 loĝantoj: Portland. La horizontoj de la Internacia Lingvo daŭre vastiĝas, kaj la okazigo de Universalaj Kongresoj en diversaj kontinentoj estas nur unu signo pri la universaligo de la movado.

Tro ofte okazas, ke iu novaĵo aŭ artikolo en la gazetaro vekas nian atenton kaj scivolon, sed poste neniam ĝin satigas. Post la unua sensacio pri grava decido farota aŭ unika libro aperonta, oni atendas pacience, sed vane, la informon pri efektiviĝo. "Esperanto" regule kaj sisteme esploras la sekvojn de antaŭaj raportoj. Tiel, interalie, ni povas fermi, almenaŭ provizore, la dosieron "Insulo de la Rozoj" (p. 62).

Enhavo

- 61 Semajno de Internacia Amikeco: Rezultoj
- 62 Dorna sorto de la roz-insulo
- 63 Portland, Oregon – urbo de la 57a UK (Deer)
- 65 Informoj de CED
- 66 Lenin kaj la Internacia Lingvo (letero)
- 66 Recenzoj
- 68 Libro-vendoj en 1968
- 69 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj)
- 69 Nekrologoj Berry, Friedrich, Gruško, Itô
- 70 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 71 54a Universala Kongreso, Helsinki, Finnlando, 1969
- 72 La Juna Vivo
- 73 Esperanto en radio
- 73 Forta UEA estas forta movado... (Carlén)
- 74 Oficiala informilo n-ro 422: Komitatanoj B elektitaj
- 75 La internaciaj konkursoj 1969
- 76 Anoncetoj

La kovrilo

Jes, ni bone scias, ke ankoraŭ ne okazis la 54-a! Tamen jam estas tempo por ĵeti anticipan rigardon al la urbo de la 57-a Universala Kongreso: Portland, Oregon, Usono. Por ke tiu unua rigardo estu kiel eble plej informa, ni larĝigis ĝin ĝis 180 gradoj, kaj la rezulta bildo ampleksas ne nur la 23-etaĝan hotelon Hilton, sed ankaŭ grandan parton de la urbo-centro, super kiu ĝi leviĝas. En la klimatizita Hilton troviĝas salonoj por ĉiaspecaj kunvenoj ĝis pli ol 2000 personoj, kaj ĉiuj aranĝoj de la Universala Kongreso povos okazi en unu sama konstruaĵo. (Foto: Corvallis)

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1883-1910).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Redaktoro: D-ro V. Sadler.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 18,75 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 25,— gld.). Unuopa ekzemplero: 1,— gld.

Banko: Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Girkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 23 27 88.

Telegramoj:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Presejo: Drukkerij Zwagers, Rotterdam-6.

Legantoj en ĉirkaŭ 80 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj kaj kulturaj rilatoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado: S-ro E. L. M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano por diskonigo de la agado de UEA: S-ro E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo. **Ĝenerala sekretario** kaj estrarano pri informado kaj kongresoj: S-ro G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangelgarten 4. Germanujo.

Estrarano pri turismo: S-ro M. Jaumotte, 44 de Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

Estrarano pri lernejoj: S-ro J. Toczyski, skr. p. 57, Gdańsk 1, Polujo.

Estrarano pri financoj: S-ro E. J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj: D-ro Peter Zlatnar, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro Ulrich Lins, D-5 Köln-Dellbrück, Gemarkenstr. 146, Germanujo.

Semajno de Internacia Amikeco : Rezultoj

Post la okazigo de la unua Semajno de Amikeco kelkaj eble demandas: Kion la Esperanta movado atingis per tiu aranĝo? Ĉu ĝi vere penindas?

En unuj landoj oni verŝajne malmulte aŭ tute ne laboris por la Semajno, kaj tie kompreneble oni ankaŭ ne atingis rezultojn. Sed en aliaj landoj esperantistoj vere laboris kaj atingis rezultojn, kiuj utilas al la movado. La leganto mem povas prijuĝi laŭ tiu ĉi mallonga kaj treege nekompleta raporto. Mi tamen volas iom raporti por jam nun instigi al pli vasta kaj pli granda laboro por la Semajno 1970.

La esperantistoj certe pli grandskale, ol mi scias, havis festajn aranĝojn en la grupoj dum la Semajno en la tuta mondo. Ili ankaŭ sendis salutojn kaj al Esperantaj kaj al neesperantaj geamikoj. Ĝenerale oni tiam uzis niajn plurlingvajn amikokartojn. En kelkaj landoj oni presigis proprajn, ekz. Hispanujo kaj Usono.

Laŭ informoj ricevitaĵ:

Bulgarujo

La landa asocio (BEA) elektis komitaton por la lando. Oni aperigis artikolojn pri la Semajno en la gazetaro bulgara kaj aranĝis publikajn kunvenojn kaj ekspozicion filatelan. Laŭ la planoj oni eldonis afiŝojn kaj bildkartojn. La bulgara komitato ankaŭ petis la poŝton uzi specialan stampon dum la Semajno. Oni ankaŭ proponis, ke ĉiu Esperanta societo kontaktu almenaŭ unu alian neesperantistan organizaĵon dum la Semajno (tre bona ideo!).

En Sofio oni aranĝis specialan esperantistan filatelan ekspozicion. La 25-an oni havis grandan tuturban kunvenon, pri kiu la radio anoncis antaŭe, informante pri la iniciato de la esperantistoj. (La kunveno forte akcentis la

Duo Espera ("Jen nia mondo") kantis en Leeuwarden, Nederlando, okaze de la unua Semajno de Internacia Amikeco.



amikajn sentojn por la Vjetnama popolo, kiu tiel longe suferas je milito. Reprezentantoj estis invititaj de Norda kaj Suda Vjetnamujo.) En angulo estis aranĝita speciala stando de Esperanta literaturo kaj esperantaĵoj. La vicprezidanto de BEA parolis, kaj poste invititaj gastoj.

Hispanujo

Ankaŭ tie oni bone laboris, aperigis afiŝojn, presigis proprajn amikokartojn, interalie en hispana lingvo.

Nederlando

Frisa Esperantista Rondo en Leeuwarden faris tre bonan laboron. Menciinda estas:

Aperigo de artikoloj en lokaj ĵurnaloj kaj de butikaj afiŝoj, kiuj instigis al sendo de salutoj, ekz. en formo de kartoj, floroj, bongustaĵoj, libroj aŭ gramofondiskoj.

La 17-an de febr. estis orgenkoncerto en Salvator-preĝejo okaze de la Semajno. S-ino Jelly Koopmans-Schotanus kantis inter aliaj "la kanton de la Semajno" — "Donu al mi vian manon, amiko", kies tekston kaj melodion verkis Ramona van Dalsem. La recenzoj pri la koncerto en la ĵurnaloj estis tre pozitivaj. La televido kaj la regiona radio havis intervjuojn pri la Semajno.

La 20-an de febr. "Duo Espera" kantis en "Café-Chantant-Passepartout". Ili kantis ankaŭ Esperante. Tiu duo estas konata per televido en Belgujo kaj Nederlando kaj per la Esperanta disko "Jen nia mondo". En la nomita ejo ordinare renkontiĝas mezlernejanoj. S-ro Jaap J. Duys rakontis al la ĝejnuloj pri Esperanto kaj ĝiaj avantaĝoj. — Tiu ĉi aranĝo estas vere laŭdinda.

Ankaŭ en aliaj regionoj de Nederlando oni festis la Semajnon. Raporton mi ekz. ricevis de la Dordreĥta grupo, "Tra la Mondo". Oni aranĝis ekspozicion, vizititan ankaŭ de neesperantistoj.

Svedujo

Landa komitato por la Semajno ekzistas. Ĝi fondis institucion, kio estas necesa por ricevi poŝtĉekan konton. La nomo de la institucio estas Amikeco Trans Limoj. Tio donas al ni protekton de la emblemo.

Por la tuta afero estis grava sukceso, ke la ĉefepiskopo de Svedujo, Ruben Josefson, la guberniestro en Örebro, Valter Aman, kaj direktoro Karlerik Savén aliĝis kiel honoraj membroj de la komitato.

La Sveda Radio faris du programojn okaze de la Semajno. Ambaŭ estis bona informado pri la lingvo kaj movado. Tion ni rigardas kiel sukceson, ĉar la Sveda Radio antaŭe ne favoris Esperanton.

Cetere la komitato en Svedujo laboris kiel en la nomitaj landoj, t.e. per afiŝoj en la butikoj, per informado en la gazetoj.

DORNA SORTO DE LA ROZ- INSULO



Ne plu flirtas la fiero flago super la "Libera Teritorio de la Insulo de la Rozoj" ("Esperanto", oktobro 1968, p. 138-140). La Konsilantaro de la "Libera Teritorio" dissendis el Svisujo pres-komunikon, laŭ kiu italaj militaj maristoj jam detruis la insulon, kiun ili okupis en junio 1968. Laŭ la komunikado, la administracio provizore loĝiĝis sur ŝipon. La "poŝtmarkoj" nun portas la surprizon "Milita itala okupado". Almenaŭ la fakton de la detruo plene konfirmas la fotoj.

Amikeco trans limoj

Pollando

La Pola Radio disaŭdigis informojn *en diversaj lingvoj* pri Semajno de Internacia Amikeco. Kompreneble tio okazis ankaŭ en Esperanto.

Aliaj landoj

Mi estas konvinkita, ke ankaŭ en aliaj landoj, ekz. Usono, Kanado kaj Francujo oni bone laboris. Sed ĝis nun ne alvenis raportoj.

Kio venos? Kompreneble la Semajno revenos dum 1970. Tiam pli da homoj ĝin festos en la tuta mondo kaj ekaŭdos pri la Internacia Lingvo kaj ĝia ideo. Sed kiom la Semajno kreskos, dependas de ni. Ankoraŭ mankas komitatoj en multaj landoj. Ili devas esti elektataj de la landaj asocioj aŭ en kunlaboro kun ili.


Dum la U.K. en Helsinki ni havos specialan kunvenon pri Semajno de Internacia Amikeco por informi kaj decidi. Se vi havas bonajn, novajn ideojn pri la Semajno, skribu al mi aŭ diru ilin dum tiu kunveno.

Dum mia laboro por Semajno de Internacia Amikeco mi parolis kun multaj diversaj homoj, aŭtoritatuloj, ĵurnalistoj, industriuloj, komercistoj k.a. Mi tiam akcentis la idealon, kiun la Semajno volas vivantigi: amikeco trans limoj, egaleco kaj frateco inter la popoloj. Tio estas ja la t.n. interna ideo de Esperanto. Ĉie — kaj ofte je mia miro — oni entuziasme akceptis tiujn idealojn. Tio konvinkis min, ke nia tempo denove fariĝas idealista. Multaj aliaj aferoj ankaŭ indikas, ke tio estas vera. Do ni ne hontu pri tiu ideo, pri kiu oni ofte emfazis, ke ĝi estas sekteca kaj tial malutila en la varbado por Esperanto. Certe venos nova tempo, kiam ĝi estos tre efika, kondiĉe ke ĝi estos prezentata en la ĝusta maniero.

Fine mi dankas al ĉiuj, kiuj laboris por tiu granda ideo: Amikeco trans limoj.

Eric Carlén

PORTLAND, OREGON - URBO DE LA 57a UK



Portland situas ĉe la kunfluejo de la riveroj Columbia kaj Willamette. Natura, navigebla akvovojo etendiĝas ekde Pacifiko ĝis profunde en la lando, kaj tial Portland fariĝis nabo por la distribuo de varoj tra la tuta regiono ĉe la nord-okcidenta marbordo.

**Jim Deer,
prezidanto
de LKK**

Pasis jam sufiĉe da tempo, de kiam Usono laste gastigis la Universalan Kongreson. En 1910 okazis la 6a en Washington, kaj en 1915 la 11a en San Francisco. Kaj nun, la 57a (en 1972), denove en Usono.

Ĉi-foje gastigos vin Portland, en la nord-okcidenta parto de la lando. Tiu bela urbo certe plaĉos al vi. Havante iom pli ol 400 000 loĝantojn, ĝi estas vera reprezentanto de la nuna Usono. Pro sia situo 100 km de la pacifika marbordo kaj 70 km de la montoj, Portland ĝuas tre mildan klimaton.

Kiu jam vizitis San Francisco aŭ Seattle, sciu, ke la klimato en Portland estas tre simila. La pluva sezono estas proksimume de oktobro ĝis aprilo. Falas nur tre malmulte da pluvo inter aprilo kaj septembro. En aŭgusto la temperaturo restas plejparte inter 60 kaj 80 gradoj F (16-27° C). Tamen oni ne miru, se en iu tago dum mallonga tempo ĝi atingos 100° F (38° C). Tio povas okazi eble unu fojon en kvin jaroj. Plej verŝajne, dum la mateno la ĉielon maldense kovros nuboj, kiuj tamen forvelkos tagmeze.

La ĵus konstruita hotelo Hilton havas ĝuste taŭgan grandecon por Kongreso de UEA. Tion asertis s-ro Cecil Goldsmith, iama ĝenerala sekretario de UEA, kiam li vizitis ĝin antaŭ nelonge. La hotelo havas grandan kunven-salonon, kiu kapablas enhavi 2 220 personojn. De la hotelo oni povas piede viziti la tutan centron de la urbo, de la rivero Willamette, unuflanke, ĝis la parko, aliflanke.

Kial ĝuste Portland?

Oni povas konsenti, ke Portland estas taŭga loko por la Kongreso, sed kial oni elektis ĝuste tiun urbon anstataŭ unu el la plej grandaj? La respondoj estas pluraj. Unue, Portland estas tia urbo, kiun povas regi la vizitantoj, anstataŭ ke ilin regus la urbo. La enfluo de 1 500 ĝis 2 000 vizitantoj estos afero sufiĉe grava, por ke la tuta urbo tion rimarku. Due, la aero estas tiel pura, kaj la trafiko tiel maldensa, ke certe povos trankviligi la nervoj de la vizitantoj. Trie, ekzistas tre aktiva Esperanto-Klubo en Portland, nome "ESPO", kun

Okcidente: la arbaro



Kiel Finnlando, tiel ankaŭ Oregon vivas per sia ligno-riĉeco. Sur la foto: arbo-kulturistoj pritondas abiidon.

ĉ. 100 membroj. En ĉiu printempo kaj aŭtuno okazas du-tri kursoj.

Iom mirige por ni estas, ke, kiam ni informas pri la 57a UK en Portland, oni ofte respondas: "Portland? Kie troviĝas Portland?" Jam estas tempo, ke eksterlandanoj komprenu, ke en Usono vere ekzistas aliaj urboj, krom New York, Chicago kaj Los Angeles.

Lando arbara kaj turisma

Portland estas la plej granda urbo de la ŝtato Oregon. Oregon laŭ sia areo estas la 9a ŝtato de Usono, sed ĝi estas nur maldense loĝata. Ĝiaj ĉefaj industrioj estas: unue, lignaĵoj kaj ĉiaj produktoj de la arbaroj; due, turismo. La ŝtaton dividas de nordo ĝis sudo la montoĉeno Cascade. Okcidente de la montoj troviĝas la arbara regiono, en kiu situas Portland. Je la orienta flanko troviĝas regiono duon-dezerta. La urbo Portland staras ĉe la kunfluejo de la riveroj Willamette kaj Columbia. Tiu lasta estas la dua plej grava de Nord-Ameriko laŭ la kvanto de akvo fluanta.

Ekskursaj planoj

Inter la jam planataj ekskursoj por la Kongreso ni povas menci tiujn: veturo sur la rivero Columbia; ekskurso al la monto Hood (alta 11 000 futojn aŭ 3 350 metrojn); vizito al indiana rezervejo; kaj ekskurso ĝis Pacifiko. La planadon de la ekskursoj gvidas s-ino Anne Whitteker, cetere prezidantino de ESPO, la loka Esperanto-Klubo.

La ĉef-delegito de UEA en Usono estas s-ro Donald Parrish, honorinda pioniro, kiu loĝas en Los Angeles. La landa asocio estas ELNA, Esperanto-Ligo de Norda Ameriko. Malgraŭ sia iom ambicia titolo, ELNA estas plejparte usona organizaĵo. Kanado kaj Meksiko havas siajn proprajn Esperanto-organizaĵojn. La ĉefa forto kaj inspiranto de ELNA estas s-ro Francis Helmuth (San Diego).


Amika kaj helpema

Vizitantoj al Usono trovos tie popolon amikan, scivolan kaj helpeman. Efektive, oni ne povas aserti, ke la plimulto de tiu popolo sentas fortan sopiron al internacia lingvo. Sed tamen, sen ia dubo, internaciismo estas forta parto de la usona animo, kaj tiu parto tre simpatias al la ideo de internacia lingvo. Necesas nur la ĝustaj kondiĉoj, por ke tiu interesiĝo pri internaciismo ekflamu de Atlantiko ĝis Pacifiko. Eble niaj eksterlandaj vizitantoj povos helpi por realigi tiun ekflamon.

Demandoj bonvenaj !

En iu estonta numero de "Esperanto" ni plue diskutos la situacion en Usono. Legantoj, kiuj havas demandojn por pritrakto, bonvolu adresi ilin al la aŭtoro de tiu ĉi artikolo, kiu estas samtempe prezidanto de LKK por la 57a Universala Kongreso. Adreso: Jim Deer, 12946 NE Hancock, Portland, Oregon, 97230, Usono.

La meleagro havas sian originon en Ameriko. Tie oni konas tiel la bronz-koloran, kiel ankaŭ blankan speciojn. Ankaŭ la ĉevalo – kaj eble eĉ la kamelo – devenas origine el Ameriko, kvankam ili kompreneble dismigris al aliaj kontinentoj multajn jarmilionojn antaŭ la ekesto de la homo.



INFORMOJ DE

CED

**CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO
PRI LA MONDA LINGVO-PROBLEMO**

**77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex,
Anglujo. Telefono (01) 904 9081.**

Esperantlingvaj elsendoj en 1968: nova rekordo

Laŭ la statistiko, kiun ellaboris la kunlaboranto de CED por la radio, s-ro G. Larglantier, la nombro de ĉiuj radio-elsendoj en 1968 estis 2 416, kompare kun 2 014 en 1967, 2 290 en 1966 kaj 1 807 en 1965. La elsendoj entute daŭris 853.20 horojn, kompare kun 715 horoj en 1967, 769.30 horoj en 1966 kaj 662.50 horoj en 1965. Rilate la nombron de radio-elsendoj en Esperanto kaj la daŭron, la jaro 1968 estis rekorda en la tuta historio de la Esperanto-Movado. La nombro de stacioj estis 18 en 14 landoj, kompare kun 20 stacioj en 13 landoj en la jaro 1967. El la listo de radio-stacioj, kiuj pli frue elsendadis, malaperis Resende kaj Teresina en Brazilo, sed aperis Bratislava en Ĉeĥoslovakio.

Plej multe da programoj havis Varsovio (entute 680), sekvis Budapeŝto (366) kaj Pekino (312), Bern (208) k.a.

Skribi al la stacioj

CED denove varme rekomendas al ĉiuj aŭskultantoj de la elsendoj en la Internacia Lingvo skribi al la koncernaj stacioj kaj komenti la elsendojn. Interesiĝo pri la elsendoj helpas al firmigo de la pozicioj de Esperanto en la radio kaj ebligas vastigon de ĝia uzo.

Lektoratoj de Esperanto

Kiel anoncite en la januara numero de Esperanto" (p. 12), CED nun faras enketon pri la katedroj kaj lektoratoj de la Internacia Lingvo. Ĝis la fino de februaro CED ricevis respondojn al la demandaro pri jenaj universitatoj: Zagreb, Pécs, Esztergom, Budapeŝto, La Laguna, Helsinko, Varna (2), Caltagirone, Catania, Innsbruck, Kraków (2), Saarbrücken kaj Hamburg. Tio estas nur parto de universitatoj, en kiuj oni oficiale instruas la lingvon. CED ankoraŭfoje insiste petas la lektorojn de Esperanto en universitatoj aŭ samrangaj altlernejoj respondi al la jam sendita demandaro. Se iu ne ricevis ĝin, bv. rekte peti de CED, 77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Britujo.

Dua eldono de "Bazaj faktoj" en la hebrea

La konata dokumento CED/7, "Bazaj Faktoj pri la Internacia Lingvo Esperanto", jam aperis en tradukoj angla, franca, hispana, japana, nederlanda, pola kaj hebrea. Nun aperis la dua eldono de la hebrea. La tradukon prizorgis la prezidanto de ELI, s-ro Aŝer Ron.

Laboro de UEA prezata de Unesko

Unesko ĵus publikigis dokumenton de pli ol 100 paĝoj sub la titolo "Appraisal of the Major Project on Mutual Appreciation of Eastern and Western Cultural Values", en kiu estas analizitaj la ĉefaj atingoj en la realigo de la Granda Projekto pri Reciproka Aprezado de la Orientaj kaj Okcidentaj Kulturaj Valoroj en la periodo 1957-1966. Kiel konate, UEA aktive partoprenis en la realigo de la projekto per aparta plano. Unu el la eroj estis la serio "Oriento-Okcidento". La agado de UEA estas menciita du fojojn en la dokumento (pp. 76 kaj 78). La dokumento emfazas, ke UEA prizorgis tradukojn de "Majstroverkoj de Orientaj kaj Okcidentaj Literaturoj sub la titolo 'Serio Oriento-Okcidento'".

Donacoj por CED

	£	ŝ	p
La stato je la 30-a de oktobro	216-17-	9	
S-ino E. Wolfskehl, Britujo	1-	0-	0
S-ro E. F. Dean, Britujo	36-	0-	0
Gesinjoroj Sly, Britujo	2-	0-	0
S-ino R. Aagaard, Nov-Zelando	0-	5-	0
S-ino E. Kruze, Germanujo	1-	0-	11
F-ino P. Sinclair, Skotlando	0-	3-	8
S-ro E. Burg, Nederlando	0-	5-	10
S-ro J. P. Jensen, Danlando	1-	7-	0
S-ro L. Michallek, Francujo		5-	5
La stato je la 31-a de decembro 1968	£	259-	5- 7

Al ĉiuj donacintoj CED esprimas tutkoran dankon. Apartan mencion meritas s-ro E. F. Dean (Britujo), kiu sola donacis la sumon £ 108-0-0. S-ro Dean kaj nombro da aliaj donacintoj konstante, ĉiujare finance kontribuas al la laboro de CED kaj tiamaniere ne nur materie helpas ĝin, sed ankaŭ kuraĝigas la personojn, kiuj per sia kunlaboro helpis kaj plue helpas, ke CED ludu la rolon, sen kiu la moderna Esperanto-Movado ne plu estas imagebla. Donacojn por CED akceptas la C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj aŭ perantoj, aŭ la Oficejo de CED je la nomo de ĝia Direktoro.

ABONU DOKUMENTOJN DE CED

Lenin kaj la Internacia Lingvo

Skribas W. G. Keable (Londono):

Publikigi opinion, atribuante respondecon sole al la opinianto, estas redaktora rajto ĝenerale akceptata. Sed disvastigi asertojn neatestitajn, sen sufiĉa kontrolo, atribuante respondecon pri vereco sole al la asertanto, estas koncepto nova en la ĵurnalismo! Per ĝi ĉia ajn neveraĵo kun agrabla aspekto flugos tra la mondo kvazaŭ per facila vento. Ĉu ne estus prudente kaj dece konsiliĝi kun la Esperanto-Komisiono en Moskvo, kies adreso ne estas sekreto, antaŭ ol riski ion, kio povas embarasi la laboron por Esperanto en Sovetio? Pagita provokisto ne povus funkcii pli efike, ol per ekstravagancaj pretendoj facile malpruveblaj de oponantoj.

Mi enmetas fotokopion de komenca paĝo en "Sur Posteno" organo de IPE kaj SEU, n-ro 150, 1934, de longa artikolo de E. Drezen mem, respondanta al "kelkaj memuaristoj", kiuj "altrudas al Lenin mem nean rilaton al Esperanto". La unua frazo tekstas: "Lenin ne sciis internacian lingvon kaj neniam detale interesiĝis pri la movado por la internacia lingvo". Cetere: "Esperanto tiam ne estis iu grava faktoro por proletoj, la movado por Internacia lingvo naskiĝis en burĝaj rondoj kaj de tiuj estis gvidata... Plej verŝajne al burĝa esp. movado Lenin povis rilati nur nee".

Ĉu Drezen ne sciis?

Se Drezen fakte sekretariis por Lenin (kiel asertis Ĉaĉe), ĉu li ne sciis ties sintenon? Mi korespondis kun Drezen pri la temo "Marksismo kaj Esperanto" kaj ankoraŭ posedas leteron de li kun indiko al studindaj fontoj; estas absolute certe, ke li menciis sintenon de Lenin, eĉ se nur konfidence. Kaj la famaj "Tezoj pri Internacia Lingvo" de la Scienc-esplora Instituto de la Lingvo ĉe la Popolkomisiono de klerigo en Moskvo, 1932, enhavas nenian diro de Lenin.

En aliaj historiaj kondiĉoj...

Sed kun atestoj, ke Lenin sendube konstatis kaj interesiĝis pri lingvaj problemoj, Drezen prezentis kaŭzojn opinii, ke en postaj aliaj historiaj kondiĉoj li trovis la laboron de la esperantistoj subteninda. Kaj estas nekontesteble, ke en Sovetio dum la vivo de Lenin kaj postaj jaroj Esperanto floris kun oficiala subteno.

La plej alloga verko de Shakespeare

Recenzas T. Nakamura (Kioto):

Somermoznoka sonĝo, de William Shakespeare. Tr. K. Kalocsay. La Laguna: Régulo, 1967. 99 p. 19 cm. (Beletraj kajeroj n-ro 30).

Eble ĉi tiu estas la plej ĉarma verko de Shakespeare: komika dramo parte realisma sed plejparte fantazia, kun homoj kaj feoj kiel la roluloj. La intrigo konsistas el fe-sorta interkonfuzo de geamantoj, kiuj estas devigataj enamiĝi en neĝustajn personojn portempe, sed finiĝas per la nupto de tri feliĉaj paroj bonordaj.

Lertega koncizigo

La lingvaĵo de l'originalo estas relative facila, sed tio neniel signifas, ke ĝia tradukado estas facila. Kurtigo de trolongo en du-versan kadreton estas lertega: "kiel herez' estas plej malamata / de ties konfesinto renegata" (32), sed foj-foje suferas ellason de l' originalaj nuancoj, kiajn mi kursive reliefigos: "Trioble 'stas benata, / kiu regas sian pasion kaj surprenas ĉi pilgrimon ĉastan, / sed mondume pli feliĉas rozo distilite," (8). Kaj aldoni de unu plia verso oftege glatigas la stilon kaj faciligas la komprenon: "Nia genio estu el nenio / ĉerpi multon kaj por tio danki, / kompreni, kion ili miskomprenas," (88).

Paroloj de kampul-aktoroj tre povas esti nenormaj; sed ĉu la etika dativo (me, you) estus tradukenda? Bobeno: "Verku por mi prologon," (34) — fakte ne Bobeno legos la prologon; "mi hurlos por vi" (17) — fakte ne por vi (sed por la damoj!).

Malgraŭ la kritiketoj, la traduko estas supera. Mi guis ĝin, deklamante en la imaga akompanado de multaj dancoj kaj kantoj.

Mendu ĉe UEA: 5,40 gld. + sendokostoj 10 %.



"band' primitiva, mekanistoj krudaj,
kiuj en siaj metioj budaj
la panon perlaboras en Ateno...."

Sceno el "Somermoznoka sonĝo", tia, kien ĝin prezentis Royal Shakespeare Company (Stratford-upon-Avon kaj Londono) en 1962. Reĝisoris Peter Hall; projektis Lila de Nobili.

MORNA LUDO

Recenzas Emiliĵa Lapenna (Jugoslavio):

Mohajra plejdo, de Ján Kákoš. El la slovaka tr. Eduard V. Tvarožek. Bratislava: Dilliza, 1968. 61 p. Mimeo. 21 cm.

La dramo de Kákoš parolas pri 30-jara geedza miskompreno, seniluziigo kaj reciproka malamamo. En Ĉeĥoslovakio kiel radio-dramo ĝi vekis grandan atenton kaj sukcese penetris ankaŭ en 8 nacilingvaj terenoj pere de tradukoj. La dramagado estas alloge komponita. Realan situacion alternas scen-en-scenaj rememoroj pri la pasintaj trompoj de lun-radioj, adultoj planitaj kaj realigitaj — ĉio kovrita per vortoj, jen petole ludaj jen brute ofendaj, volvitaj en nebulo de alkoholo kaj malespero kaj ĉe la fino memmortigo, inside aranĝita de la edzino, por ke la edzo ne povu eskapi la kulpon pro tio. Morte morna, plena de diversaj agordoj, tiu dramo iel simbolas la nunan mondon ofte trovantan en kruda nenligo la solan eliron por siaj groteskaj kontrastoj.

La teatra lingvo devas esti perfekta. La lingvo de Tvarožek estas nur bona.

Mendu ĉe UEA: 1,80 gld. + sendokostoj 10 %.

Pordo al la kataluna literaturo

Recenzas

Johan Hammond Rosbach (Norvegujo):

Soleco, de Víctor Català. El la kataluna tr. Josep Ventura-i-Freixas. Barcelona: 1967. 287 p. Ilus. 22 cm.

La granda dana literaturkritikisto Vilhelm Andersen diris en sia libreto pri literatursciencaj metodoj (1912), ke tiu literaturscienisto, kies temo estas nacie difinita literaturo, ĉiam penetras en tiun temon per la pordo aŭ fendo de unu sola verko, kaj ne per la pordego de la kulturhistorio aŭ popolsikologio.

Guste tiel mi konatiĝis nun per la romano "Soleco" kun la kataluna literaturo. Mi konis nek la romanon, nek la aŭtorinon, nek la Reĝan Akademion de Beletristiko en Barcelono, kies membro ŝi estis, nek la katalunan literaturon entute. Denove Esperanto peras naŝan literaturon.

Verko larĝpenika

Víctor Català estas la pseŭdonimo de Caterina Albert i Paradís, kiu mortis en la aĝo de 96 antaŭ tri jaroj. La romano "Soleco" aperis kiel feliĉetono en 1904-1906, verkita laŭ komisiio. Ĝi ne estas streĉa en la senco de vigloenhava kaj aventura, sed larĝpenike pentras la personojn — cetere nur malmultajn — kaj lokojn, la farojn kaj la medion, kaj iom post iom ĝi kaptas la atenton kaj la intereson de leganto, kiu ne emas rapidi tra la libroj.

La enhavo efektive estas tre simpla. La libron oni anoncis kiel "montaran romanon", kaj la tuta temo estas geedzoj, kiuj supreniras al la monaĥejo (cetere sen monaĥoj, sed kun paŝtisto), t.n. ermitejo. Tie la edzino laboras kiel ermitino, purigas, ĉarme konversacias kun la paŝtisto, kiu scias lerte rakonti belajn fabelojn, travivas religian feston kaj vivas la ĉiutagan vivon.

La verkon tradukis Josep Ventura-i-Freixas, kiu neniel havis facilan taskon. Li bone majstras Esperanton, sed emas uzi longajn kunmetaĵojn kiel ekz. "entrancelgante". La tradukinto feliĉe donis piednote klarigojn pri multaj aferoj alie nekompreneblaj. Kaj li klarigis neologismojn necesajn kaj nenecesajn. La nenecesaj estas multaj; jen nur tri ekzemploj: *homunkulo* (= hometo) estas nenecesa kaj neklarigita, *anodina* (= sensignifa, malgrava), *anfrakta* (= malrekta, zigzaga) klarigitaj sed ja nenecesaj.

Konkludo: leginda. Des pli, ĉar la multaj desegnaĵoj de Alexandre Coll estas ĉarmaj kaj lerte faritaj.

Mendu ĉe UEA: 19,20 gld. + sendokostoj 10%.

PARNASA GVIDLIBRO REELDONITA

Recenzas Baldur Ragnarsson (Islando):

Parnasa gvidlibro, 2a eld. reviziita kaj kompletigita: de K. Kalocsay, G. Waringhien kaj R. Bernard. Warszawa: Pola Esperanto-Asocio en kunlaboro kun "Heroldo de Esperanto", 1968. 157 p. 21 cm.

Meritas sobran atenton

La dua eldono de la *Parnasa Gvidlibro* estas dividita (kiel la unua de 1932) en tri ĉefpartojn: *Skizo de Esperanta Metriko* (aŭtoro G. Waringhien), *La Arto Poetika* (aŭtoro C.E.R. Bumy, t.e. K. Kalocsay) kaj *Esperanta Rimaro* (kompilintoj G. Waringhien kaj R. Bernard). Malgraŭ la diro de Waringhien, ke li ne intencas instrui, sed "simple kompili kaj ordigi", oni rajtas supozi, ke la celo de Parnasa Gvidlibro estas unuavice instrui kaj gvidi, kiel efektive atestas ĝia titolo.

Kio estas nova en la dua eldono de tiu ĉi fama verko? Ĉar mi ne posedas la unuan eldonon, mi povas nur juĝi laŭ memevidentaĵoj kaj iuj internaj atestoj. Oni kompreneble tuj rimarkas la nomon de Roger Bernard aldone al tiuj de la pra-aŭtoroj. Lia kontribuo laŭŝajne rilatas nur al la Rimaro. La nuna bazo de la rimaro estas la kvara eldono de la Plena Vortaro kun Suplemento (1953), sed krome estas enregistritaj multaj neologismoj el postaj verkoj, novaj teknikaj vortoj kaj aldonaj propraj nomoj. La Rimaro estas evidente admirinde konscienca laboro.

Kion novan prezentas la dua eldono de la *Metriko* de Waringhien? En subnoto li atentigas pri tio, ke li plurloke substituis al la klarigaj ekzemploj de la unua eldono aliajn el la Esperanta Antologio redaktita de Wm. Auld (1958). La Bibliografio inkluzivas ankaŭ novajn verkojn, kvankam ĝi ne celas esti komplete. Ĉu la teksto mem estas multe modifita mi ne povas prijuĝi, ĉar mi ne havas la eblecon de komparo. La *Arto Poetika* de Kalocsay — versa poetiko en ses kantoj — ne estas prikomentita kaj do kredeble sen ŝanĝoj.

En la jaroj de mia junula Esperantisteco mi lernis respekti la Parnasan Gvidlibron — ne el senpera sperto, ĉar mi tiam ankoraŭ ne vidis ĝin, sed la oftaj primencioj kaj submetiĝemaj referencoj en nia literaturo al tiu altaŭtoritata aŭreolaĵo. Eĉ hodiaŭ pluvivetas tiu kulta sinteno en iu senkulpa angulo de mia animo malgraŭ certa elreviĝo je okaza deprunto de la koncerna verko antaŭ kelkaj jaroj kaj daŭre kreskantaj duboj pri la valoro de "gvido" en poeziaj aferoj. Mi tamen tre pretas agnoski, ke la libro meritas sobran atenton almenaŭ kiel historia dokumento. Tradukantoj de poezio certe ankaŭ trovos tie praktikajn konsilojn koncerne certajn teknikajn punktojn en la versarto, kaj ordemuloj kaj formaĵuloj kontentigaĵojn. Sed efektive la libro kiel tuto estas iel eksteraĵa afero, apenaŭ koncernanta sin profunde pri la naturo de la poezio.

Mendu ĉe UEA: 5,75 gld. + sendokostoj 10 %.

Libro-vendoj en 1968

La plej vendata belliteratura verko en 1968 — laŭ statistikoj de UEA — estis "La spleno de Parizo", la fantaziriĉa proz-poemaro de la franca poeto Charles Baudelaire, tradukita de Paul Lobut kaj eldonita en la Serio Oriento-Okcidento de UEA. (Kiel la numero 10 en la serio aperos post kelkaj monatoj La Nobla Korano).

El originala fikcio en Esperanto plej sukcese vendiĝis en 1968 la novelaro de Marjorie Boulton "Okuloj", aperinta ĉe Stafeto. Recenzoj laŭdis ĝin ŝia ĝis nun plej matura proza verko.

Sur la kampo de nefikcia literaturo venkis la rakontoj de Nassif Isaac, "Vojaĝimpresoj de egipto — tra Azio kaj Eŭropo per Esperanto", kies titolo jam sufiĉe priskribas la enhavon.

La merkato por pure pri-Esperantaj libroj estas ĉiam vigla. En la pasinta jaro plej petata en tiu kategorio estis la dua volumo de la tre utila "Gvidlibro por supera ekzameno", redaktita de Alfonso Pechan kaj eldonita de Hungara Esperanto-Asocio. Al tiu dua volumo, kiu prezentas ampleksan skizon de la historio kaj literaturo de Esperanto, kontribuis pluraj elstaraj verkistoj, inkluzive de Kalocsay.

Apenaŭ menciinde estas, ke la plej vendataj lernolibro kaj vortaro de la jaro estis respektive "Privilegia vojo" kaj "Plena vortaro". La simpatia internacia lernolibro de Setälä kaj la plej kompleta vortaro nuntempe aĉetebla estas ambaŭ tiel bone konataj, ke reklamado estas preskaŭ superflua.

La gramofondiskoj estis iam la plej modesta angulo de niaj libroservoj. Hodiaŭ la situacio ŝanĝiĝis, kaj kelkaj diskoj regule troviĝas inter la plej vendataj el ĉiuj Esperanto-eldonaĵoj. En 1968 denove elstaris super ĉiuj aliaj la malmultekosta disko "La feliĉo", de la nederlanda kantistino Ramona van Dalsem, eldonita de UEA. Tamen ankaŭ kelkaj pli kostaj diskoj tre bone vendiĝas, kaj la konkurenco en 1969 estos certe tre akra.

Tiu ĉi superrigardo pri la plej vendataj eldonaĵoj de 1968 estas bazita sur analizo de ĉiuj rektaj, unuopaj vendoj de la Libroservo de UEA en Rotterdam. Ĝi do ne konsideras kvantajn vendojn al revendistoj, nek la vendadon ĉe aliaj libro-servoj, pri kiu statistikoj mankas.

LASTE APERIS

Kalendaron 1969 eldonis ankaŭ Fremdlingva Eldonejo Pekino: "Ŝaŭŝan, la hejmloko de prezidanto Maŭ Zedong". El suda Azio alvenis novelaro de Thao boun lin k.a. aŭtoroj laosaj, "La sovaĝa kokino", eld. Neo Lao Haksat. Aktivis literaturo ankaŭ la baltaj landoj: dum en Riga aperis 67-paĝa antologieto "Latva poezio 1945-1966" — la unua presita libroforma eldonaĵo en Esperanto aperinta en Soveta Unio de antaŭ la milito — en Tallinn eldonejo Periodika ekvendis estonan tradukon de "Vivo kaj opinioj de majstro M'saud", kies Esperantan originalon verkis Jean Ribillard. Tradukis Henrik Sepamaa.

La dua lernolibro de Auld

Sur la kampo de lernolibroj k.s. plej menciindaj estas: "Paŝoj al plena posedo; Progresiga legolibro de Esperanto kun lingvaj ekzercoj" de William Auld, aperinta ĉe Heroldo de Esperanto je 7,20 gld. (237 p.); du bonkvalite mimeografitaj rakontoj por infanoj, de

J. H. Sullivan, "La longa marŝo" kaj "La junaj trezor-serĉantoj", po 24 p. kaj po 1,— gld.; kaj "Clave de Esperanto", grandformata "ŝlosilo" eldonita en Meksiko de la aŭtoro Alberto Gómez-Cruz, 58 p., 1,25 gld. Eldonejo Itis en Saarbrücken (Germanujo) daŭrigas sian serion da fotorepresoj de praverkoj per broŝuro de René de Saussure, "Konkurso: Kia estas la logika senco de l'vorto 'GRANDO'?" (1911).

Centpaĝa volumo de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, riĉe ilustrita, prezentas la turismajn avantaĝojn de tiu lando sub la titolo "Invito" (13,— kĉs); alispecan veturon proponas al ni Fremdlingva Eldonejo Hanojo "Tra la liberigita zono de Laoso" (53 + 8 foto-p.).

Iom konfuze, la kovrilo de nova broŝuro de IKI en Nederlando portas la titolon "La nova testamento". La efektiva enhavo estas la leteroj de s-ta Paŭlo al la Korintanoj. Prezo: 3,— gld. Aperis ankoraŭ unu filozofia verko de Domenico Pastorello en Esperanta traduko: "La kaoso", 73-paĝa.

Fine, sed ne malgrave, la Ministerio por Kulturo de la Ukraina SSR eldonis mimeografe 54-paĝan bibliografion de tradukoj italaj, hispanaj, portugaliaj kaj Esperantaj el la verkoj de la poeto T. G. Ŝevĉenko (kies nomo formas ankaŭ la titolon de la libro).

Mendojn de novaj eldonaĵoj oni bv. adresti al la Libroservo de UEA. Ĉe novaj eldonaĵoj ne ĉiam eblas tuj indiki prezon en guldenoj. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10 % por sendokostoj.

LA PLEJ GRANDA LIBROSERVO DE ESPERANTO estas sendube la Libroservo de UEA en Rotterdam. Kvankam librovendado estas la ĉefa laboro, ankaŭ la perado de gazetabonoj ludas gravan rolon. Ĉirkaŭ 93 % de la komerco estas direktita ekster Nederlandon. Sur la foto: angulo de la Ĉambro Llech-Walter, en kiu okazas la ĉefaj laboroj de la Libroservo.



Nekrologoj

JOSEF FRIEDRICH (1890-1968)

La 21.12.1968 estis kremaciita en Brno (Ĉeĥoslovakujo) s-ro Josef Friedrich, unu el la ĉefaj funkciuloj de la iama Ĉeĥoslovaka Esperanto-Asocio. Li lernis la lingvon jam en 1906, fondis la societon en Olomouc en 1911 kaj dum la unua monda milito estis militkaptito kun Julio Baghy en Siberio.

EVELYN BERRY

Mortis la 27-an de januaro je la aĝo de 68 jaroj f-ino Evelyn Berry, delegito en Haslingden, Britujo kaj tre malnova membro de UEA k.a. organizaĵoj.

VIKTOR GRUŠKO (1906-1969)

Neatendite mortis pro kormalsano s-ro Viktor Gruško, aktiva delegito de UEA en Rostov-Don, Soveta Unio.

ITŌ SABURŌ (1902-1969)

Pro pneŭmonio forpasis en Tokio la 7-an de marto s-ro Itō saburō, konata figuro de la japana movado, aktivulo de MEM kaj SAT. Krom diversaj japanlingvaj verkoj, li aŭtoris "Verda Parnaso" kaj iniciatis "Infanoj de la Mondo".

LOKE - FAKE - PERSONE

FAKE

Kino

● La Turisttrafika Asocio de Oslo ĵus eldonis duan filmon pri Oslo kun Esperanta komentario: "Oslo, la vikinga ĉefurbo", filmo 16-mm., kolora, 20-minuta. Liveras ĝin Norvega Esperantista Ligo (Boks 942, Oslo 1) kontraŭ 2 respondkuponoj.

Reklamado

● Sub la nomo "Esperanta Tutmonda Reklam-servo" fondiĝis profesi-nivela internacia organizaĵo, kiu celas varbi anoncojn por Esperanto-eldonaĵoj. Londona adreso: 801 St. Albans Road, Watford, WD2 6LA.

LOKE

Danujo

● "Dansk Esperanto-Institut" nomiĝas nova entrepreno, kiu celas instrui per koresponda kurso modernstila. Sistema anoncado en danaj ĵurnaloj rezultigis en la unuaj monatoj centojn da informpetoj kaj kvindekonojn da lernantoj.

Hindujo

● La 500-voluman bibliotekon de Bengala Esperanto-Instituto transprenis lastatempe la Hinda Nacia Biblioteko (Belvedere, Kalkato 27).

Madagaskaro

● Esperantista Asocio de Madagaskaro fondis la 9-an de februaro 1968 apartan instancon "Malagasa Esperanto-Instituto", kies tasko estas unuavice lingvo-kontrola, ekzamena k.s. La nova Instituto estas leĝe rekonita.

Nederlando

● Sub la titolo "Komuna Esperanto-Gazeto" aperas de post januaro 1969 nova, tutnederlanda organo, komuna inter ĉiuj Esperanto-organizaĵoj.

Rumanujo

● La 30-an de decembro la Rumana Televido elsendis intervjuon kun f-ino Julia 'Sigmond pri la partopreno de la Stata Pupteatro el Cluj en la Pupteatra Festivalo en Esperanto en Zagreb en 1968.

Soveta Unio

● Post la armena, ukraina kaj uzbeka, nun ankaŭ la latva respubliko havas Esperanto-instancon: "Komisiono pri internaciaj ligoj de latviaj esperantistoj". La komisiono (adreso: RIGA, Gorkija ielâ 11-a) jam eldonigis antologieton de la latva poezio en Esperanta traduko: la unua normale presita libro en Esperanto el Soveta Unio de antaŭ la milito.

Usono

● Anticipe al la 57-a Universala Kongreso en Portland (1972), la Informa Centro de ELNA jam ĉi-jare distribuos 25 000 ekzemplerojn de nova anglalingva broŝuro 32-paĝa verkita de Mario Pei kaj eldonota en 35 000 ekz. de vaste konata komitato "Public Affairs Committee".
● La konata verkisto Henry Miller ("Tropic of Cancer", "Tropic of Capricorn" k.a.) interesiĝis pri Esperanto kaj invitis 20 membrojn



Tiu ĉi simpatia vikingo, "vivanta" pupo, simbolas la vikingan ĉefurbon Oslo en la nova filmo eldonita de Film-Centro Ivo Caprino. (Vidu: Kino.)

de kaliforniaj societoj al sia hejmo en januaro. Je lia deziro legi en Esperanto verkon de Mark Twain la Biblioteko de UEA liveris fotokopie la rakonton "La £ 1.000.000 banka bileto".

PERSONE

Aisberg

● Antaŭ ĝuste 50 jaroj lernis Esperanton ing. E. Aisberg, plej konata kiel aŭtoro de "Fine mi komprenas la radion". La jubileon li festas per nova verko "La physique dans la vie quotidienne", kiu cetere pledas por Esperanto.

Bokarev

● Fininte tezon pri histori-kompara fonetiko de kaŭkazaj lingvoj, prof. d-ro E. Bokarev, membro de la Akademio de Esperanto, kiel vic-direktoro de la Lingvosciencia Instituto en Moskvo nun ofice pristudas la temon "Problemo de lingvo internacia".


Egami

● Profesoro Fufio Egami, prezidanto de Japana Esperanto-Instituto, komitatano de UEA, preleginto de ISU ktp, fariĝis prezidanto de Japana Scienca Konsilantaro, la ŝtata organizaĵo, kiu reprezentas ĉiujn sciencistojn de Japanujo.

Schwartz

● La 8-an de aprilo ĉi-jare festas sian 75-jariĝon la renoma verkisto Raymond Schwartz, konata unuavice pro siaj humuraĵoj, sed laste ankaŭ pro la longa romano "Kiel akvo de l'rivero".

Jam post kvar monatoj!



54-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Helsinki, 26 julio - 2 aŭgusto 1969

Alta Protektanto: D-ro Urho Kaleva Kekkonen, Prezidanto de Finnlando.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.



OFICIALA KOMUNIKO

Honora Komitato

Al la Honora Komitato de la Kongreso aliĝis dek eminentuloj de la finna publika vivo, i.a. la Ministro por Publika Instruado, s-ro Johannes Virolainen.

Oratoroj, preparu vin!

Jam tri temoj estas fiksitaj por la ĉi-jara Oratora Konkurso, kiun rajtas partopreni kongresanoj ĝis 28 jaroj: (1) Senco de la studenta ribelo, (2) Kosma veturado — ĉu valoras? (3) Internaciismaj tendencoj en moderna filozofio kaj internacia lingvo.

La plej alloga ekskurso

Jam alvenadas mendoj por la 5 oficialaj kaj 4 neoficialaj ekskursoj anoncitaj en la Dua Bulteno. Ĝis nun la plej mendata estas la taga ekskurso tra la ĉefurbo mem, sed el la tuttagaj ekskursoj plej alloga montriĝas la aŭtobus-motorboata ekskurso Hämeenlinna-Valkeakoski. El la ekskursoj neoficialaj plej mendata estas la postkongresa veturo al Leningrad.

Nova karavano anoncita

Esperanta Societo Ljubljana (Slovenujo, Jugoslavio) — adreso Taučarjeva 2/I — anoncas 21-tagan grupvojaĝon al la 54-a UK, de 26 julio

ĝis 15 aŭgusto. Oni flugos de Ljubljana al Helsinki kaj revenos aŭtobuse tra pluraj skandinaviaj kaj kontinentaj landoj.

Loĝado en Helsinki

Konata vojaĝ-oficejo en Usono informis kongresanojn, ke sole per ĝi estas mendebla la loĝado en Helsinki. Tiu informo estas erara. Ĉiuj individuaj kongresanoj el kiu ajn lando povas mendi sian loĝejon pere de la Loĝiga Servo de la Kongreso, uzante la mendilon en la Dua Bulteno.

Kiu deziras loĝi en kampadejo, tiu sin turnu al turisma oficejo. En Helsinki troviĝas du kampadejoj, el kiuj tiu de Lauttasaari estas pli proksima al la kongresejo.

Originala memorajo

Kiel memorajon pri la Kongreso, Fondumo Esperanto (adreso: Esperantotie 4, Iirislahti, Helsinki, Finnlando) eldonis platan monerujon en formo de oportuna skatoleteto kun apartaj risortitaj fakoj por 5 monerospecoj. Prezo: 3,50 gld. La monerujo surhavas la emblemon de la Kongreso.

Idealaj kondiĉoj por la Infana Kongreseto

Kiel jam anoncite, la 11a Internacia Infana Kongreseto okazos en lernejo Aarnivalkea, unu el la multaj modernaj lernejoj de la ĝardenurbo Tapiola. La lernejo mem situas nur 1,5 km for de la kongresejo de la 54a UK. Granda parto de la programo estas jam aranĝita: ekskursoj al insuloj Seurasaari (kun etnologia muzeo) kaj Korkeasaari (zoologia ĝardeno) kaj al Suomenlinna, fama fortikaj-insulo. Abundos eblecoj por naĝado kaj ludado. Jam aliĝoj komencis alveni. Specialaj aliĝiloj estas riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

Lastmomente

Ĝis la momento de redakto aliĝis al la 54a UK entute 1223 personoj el 34 landoj: ĉ. 125 pli, ol en la sama tempo por Madrid.

Finnlando estas lando de lagoj — sed ankaŭ de insuloj, kiel tiu ĉi, kie kviete dormas fiŝista boateto inter la rokoj....



LA JUNA VIVO



**Oficiala organo de TUTMONDA
ESPERANTISTA JUNULARA
ORGANIZO.**

**Respondekas: Robert Lloancy,
LJV, rue de la Marinade,
F-66-Tresserre, Francujo.**

NOVA LANDA SEKCIO DE TEJO

Post la aliĝo de la sekcioj de Brazilo kaj Meksiko, la junulara asocio de Grekujo petis sian aliĝon al TEJO. Post sciigo al la komitatanoj de TEJO, la nova LS estas unuanime aprobita. Ni kore bonvenigas niajn grekajn amikojn, kaj deziras al ili fruktodonan kunlaboron.

JUNULARA ESPERANTO-KONGRESO EN NOV-ZELANDO

Kune kun la 34a nacia kongreso de Esperanto en Nov-Zelando, okazinta en Blenheim (suda insulo), estis la 4a Junulara Kongreso, aranĝita de la LS de TEJO: EJANZ. Unuafoje oni grandskale organizis la proprajn programojn kaj aktivojn — malfermo, eksteraj lingvaj sesioj, partopreno en 18-mejla provinca promenado, sporta tago, arta elmontraĵo. Por la plenaĝuloj oni prezentis neformalan koncerton, kaj de ili oni akiris monon por agado E3 en Afriko, kies celo estas helpo al la blinduloj. Du junulinoj ĉeestis la kongreson senpage pro gajno de lerneja ekzameno en Esperanto. Kvarono el la 80 kongresanoj kaj du el la 7 alilandaj vizitantoj estis gejunuloj.

Kvar el la sep alilandaj kongresanoj en Blenheim: (de supre) ges-roj Isobe, la 10-jara Majo kaj 4-jara Juli. Majo kaj Juli partoprenis la junularan kongreson.



ELDONAĴO EN ARGENTINO

Argent-ejo, la LS de TEJO en Argentino, eldonis sian oficialan organon por la jaro 1968, kies titolo estas: Perspektivo. La 24-paĝa broŝuro entenas artikolojn hispanlingvajn kaj en Esperanto. Inter ili menciindas la teksto de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj kaj eltiraĵo el CED-dokumento: la kosto de multlingvismo, en Hispana lingvo. Artikoleto celas prezenti la programon Pasporto, gravan helpilon por la interhoma komunikado, pri kies utiligado ne ĉiuj homoj bone konscias.

SKOLTOJ KAJ ESPERANTO

La rilatoj inter Skolta Esperantista Ligo (SEL) kaj la Monda Skolta Oficejo (SMO) lasttempe rapide ŝanĝiĝis. Tion kaŭzis precipe la sukceso de la dulingva ĵamboreo en Britujo, pasintan someron, kie oni uzis Esperanton; kaj la timo pri malsukceso de la venonta monda ĵamboreo en Tokio en 1971 pro lingvaj baroj. De tio rezultis, ke la sinteno de la Monda Skolta Oficejo evoluis rilate Esperanton.

SEL lanĉis la "adoptan planon" speciale por la granda nombro da esperantistoj, kiuj jam nun, el propra iniciato, kun nova energio informadas en skoltaj medioj.

La donaco okazu, se eblas, la 1an de septembro 1969. Se tiu donaco ripetigos cent, mil fojojn, en multaj urboj en ĉiuj landoj, tiam la informado pri Esperanto en skoltaj medioj estos maksimuma. Ni insiste petas la unuopajn esperantistojn, ke ili ne el propra iniciato intervenu en la korespondo inter SEL kaj SMO, aŭ la japana ĉefestraro.

La ĉi-supre menciita donaco konsistas el belaspekte ofsetita libro "ĵamborea lingvo". Dank'al helpo de oficiala nederlanda instituto, la prezo estas nun 2,50 Gld. (rabato de 25 % por mendoj de 10 ekzempleroj). Mendu vian ekzempleron per antaŭpago al J. K. Hammer, Taxusstraat 7, Zaandam, Nederlando. Poŝtkonto: 63-22-46.

BONVOLMESAĜO DE LA KIMRA JUNULARO

Kiel en antaŭaj jaroj la kimra sekcio de la BBC dissendos per radio la bonvolmesaĝon de la kimra junularo. Lastjare, pro la granda reago inter esperantistoj en aliaj landoj, okazis pli ol 10 mencioj de Esperanto en la broŝuro pri la elsendo. Bonvolu peti en via lando pri eventuala re-dissendo. Aŭskultu kaj respondu en Esperanto al F-ino Tharme, 22 Belmont Avenue, Bangor Caerns, Wales, Britujo.

INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

Oni ja bone scias, ke la IJK de TEJO por 1969 okazos en Tyresö, antaŭurbo de STOCKHOLM, de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto. La aktivema LKK promesas bonan organizadon kaj certigas amikan etoson. En la unuaj tagoj de januaro aperis faldbroŝuro, kiu donas ĉiujn informojn pri la urbo, kaj skizas la programon de la 25a IJK; oni ankaŭ povas uzi parton de ĝi kiel aliĝilon. Memoru, ke de post la 31a de marto la kotizoj plialtiĝis je 2 us. dol. Aliajn informojn legu en La Juna Vivo de februaro.

ESPERANTO EN RADIO

Ciujn informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris 16, Francujo. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn vidu en la Jarlibro 1968, Unua Parto, p. 120. Mallongigoj: I = Informoj; P = Parolado; K = Kurso.

Ciutage

05.30-06.00 Warszawa, ripeto de la antaŭa vespera programo. 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 42.11 m (7125 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 25.09 m (11955 kcs).

15.30-16.00 Warszawa, 31.50 m (9525 kcs), 25.34 m (11840 kcs). I.P. Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Warszawa, Pollando.

22.30-23.00 Warszawa, 41.18 m (7285 kcs), 31.41 m (9525 kcs). I.P.

Dimanĉo

11.00-11.30 Pekino, 47.69 m (6290 kcs). I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.

11.30-12.00 Muritiba, 190 m (1580 kcs). I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.

12.30-13.00 Pekino, 25.12 m (11945 kcs), 19.89 m (15080 kcs) I.

20.00-20.20 Roma, 50.08 m (5990 kcs), 41.24 m (7275 kcs), 30.90 m (9710 kcs), P. Radio Roma, Esperantofako, Casella postale 320, Roma, Italujo.

20.05-20.30 Sofia, 50.62 m (5920 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.

21.45-22.00 Manila, 25.17 m (11920 kcs). P. Far East Broadcasting Co., Box 2041, Manila, Filipinoj.

22.45-23.00 Valencia, 278 m (1079 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.

23.30-23.55 Sofia, 49.42 m (6070 kcs), 31.38 m (9560 kcs). P.

Lundo

00.00-01.00 Sorocaba, 278 m (1080 kcs), I.K. Rádio

Clube de Sorocaba, rua São Bento 245, Sorocaba (São Paulo), Brazilo.

12.05-12.15 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 16.80 m (17855 kcs), 13.94 m (21520 kcs). P. (D-ro A. Baur). Svisa Radio, S.O.C. Bern-16, Svislando.

18.00-18.15 Stoke-on-Trent, 94.9 Mcs (mod. frekv.). K.I. Radio Stoke, Cheapside, Hanley, Stoke-on-Trent (Staffs.), Britujo. (la kvaran lundon de la monato, de 18.00 ĝis 18.30; kelkaj programeroj en la angla).

Merkredo

12.05-12.15 Bern, kiel lunde. (S-ro C. Gacond).

13.45-14.00 Wien, 203 m (1475 kcs). P. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo. (ĉiun alternan merkredon).

14.00-14.15 Stoke-on-Trent, kiel lunde.

23.05-23.30 Bilbao, 212 m (1412 kcs). I. P. Radio Bilbao, Apartado 1117, Bilbao, Hispanujo.

Ĵaŭdo

10.00-10.15 Manila, Kiel dimanĉe.

21.50-22.00 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 31.27 m (9595 kcs), 25.25 m (11880 kcs). P. (D-ro Baur).

23.05-23.20 Zagreb, 264 m (1133 kcs). P. Radio Zagreb, Jugoslavujo.

Vendredo

20.00-20.30 Pekino, 45.32 m (6620 kcs), 45.17 m (6640 kcs), 42.37 m (7080 kcs), 30.43 m (9860 kcs). I.

Sabato

11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.

12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.

14.30-14.40 Rosario, 229 m (1310 kcs). P. Radio Nacional, Cordoba 1331, Rosario (Santa Fe), Argentino.

20.00-20.30 Pekino. Kiel vendrede.

21.50-22.00 Bern. Kiel ĵaŭde (S-ro Gacond).

RADIO WARSZAWA krom la ĉi-supre anoncata ĉiutaga programo prezentas "Anguleton por Esperantistoj" dum la jenaj nacilingvaj programoj:

— angla merkrede inter 11.00 kaj 11.25 per ondoj 25.34 m (11840 kcs), 19.64 m (15275 kcs);

— germana ĉiutage escepte dimanĉon inter 07.30 kaj 08.00 per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 42.11 m (7125 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 25.09 m (11955 kcs);

— itala merkrede inter 12.00 kaj 12.25 per ondoj 25.42 m (11800 kcs), 19.71 m (15215 kcs), la saman tagon inter 21.00 kaj 21.30 per ondoj 50.25 m (5970 kcs), 41.18 m (7285 kcs), kaj dimanĉe inter 11.30 kaj 12.25 per ondoj 25.42 m (11800 kcs), 19.71 m (15215 kcs).

NOTO: La stacioj Bern, Pekino, Roma, Warszawa regule sendas senpagan programon de siaj elsendoj al petantoj.

Forta UEA estas forta movado Forta movado venkigas la lingvon

UEA havas mirindan reton de delegitoj tra la tuta mondo. Ekzistas laŭ la jarlibro ankaŭ specialaj delegitoj por multaj diversaj fakoj. Ili ĉiuj estas je dispono por la individuaj membroj. La servo, kiun UEA prezentas al la membroj, estas vere unika kaj por multe da homoj eksterordinare valora. Se vi samopinias, estas via morala devo helpi al UEA varbante unu aŭ plurajn novajn membrojn. Kaj nun mi havas peton al membroj, kiuj iam uzis la servon de la delegitaro: Se vi ricevis valoran helpon, bonvolu skribi al mi mallongan raporton. Min precipe interesas servoj faritaj en sciencaj aŭ kulturaj fakoj sed ankaŭ volora turista helpo. Mi intencas poste verki artikolo(j)n en la Esperanta gazetaro kaj alie por varbi por UEA. Mi ne povas garantii, ke vi ricevos respondon de mi. Tamen skribu, se vi spertis delegitan servon, kiun vi mem opinias valora. Faru por danke helpi al UEA kaj al Esperanto.

Erik Carlén,

Yxhult, S-690 60 Hällabrottet/Svedujo.

Komitatanoj B elektitaj

Kiel anoncote en la januara kaj februara numeroj de "Esperanto" (p. 19 kaj 38), devas okazi en 1969 elekto interalie de novaj komitatanoj B. Ĉar post forpaso de la fiksita dato (la 1a de marto) la nombro de valide proponitaj kandidatoj (4) ne superis la nombron de elektotaj komitatanoj B (6), voĉdono ne okazis, sed ĉiuj kandidatoj estas konsiderataj kiel elektitaj. (Konforme al la Ĝenerala Regularo de UEA, senpage ricevebla de la Centra Oficejo).

Unu nova nomo

El la kvar elektitaj komitatanoj B, unu estas nova. Lia oficperiodo komenciĝos la unuan tagon de Universala Kongreso en Helsinko. Sekvas la nomoj de la elektitaj komitatanoj: Prof. d-ro I. Lapenna; U. J. Moritz (nova); prof. J. Régulo-Pérez; rektoro K. Söderberg.

Pliaj kandidatoj?

La nombro de delegitoj de UEA permesas, ke oni elektu ĝis 6 komitatanojn B por la venonta oficperiodo. Ĉar ĝis nun prezentigis nur 4 kandidatoj, ili estis aŭtomate elektitaj. Tamen restas ankoraŭ 2 vakaj lokoj, kaj nenio en la Statuto kaj Regularoj de UEA malhelpas, ke ili ankoraŭ estu plenigitaj.

La direktoro de la Centra Oficejo do denove petas la ĉefdelegitojn (ne la vicdelegitojn aŭ fakdelegitojn) sendi proponojn pri kandidatoj por la 2 vakaj lokoj, kun iliaj skribaj konsentoj, antaŭ la nova limdato: la 1a de junio 1969.

Pri ĉiuj aliaj detaloj de la kandidatigo kaj eventuala voĉdono restas validaj la informoj aperintaj en "Esperanto", januaro 1969, p. 19.

PLIA FAKA ORGANIZAJO KUNLABORAS KUN UEA

La 1-an de marto 1969 la Komitato de UEA aprobis per 34 voĉoj kontraŭ 0 kaj unu sindeteno kontrakton pri kunlaboro inter UEA kaj Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj (IABO). La celoj de la nove kunlaboranta organizaĵo estas: helpi profesulojn per internacia kunlaboro sur la biblia kaj orientalisma kampo kaj disvastigi en la mondo la biblian kaj orientan kulturon. La Asocio jam regule eldonas la dumonatan Biblian Revuon. Adreso: D-ro Angelo Duranti, Piazza Duomo 4, I-48100 Ravenna, Italujo.

Entute 26 fakaj kaj neneŭtralaj organizaĵoj estas nuntempe aŭ aliĝintaj al UEA aŭ kunlaborantaj kun ĝi konforme al la kondiĉoj en artikoloj 14-16 de la Statuto de UEA.

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

Okaze de la unuafoja Semajno de Internacia Amikeco, en februaro 1969, la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam ricevis nombron da salutoj kaj bondeziroj el diversaj kontinentoj. Per tiuj ĉi linioj ni tre kore dankas kaj reciprokas la kuraĝigajn salutojn!

MAGNETOFONA SERVO

Uzantoj de la Magnetofona Servo de UEA bv. noti, ke la komisiito pro eksterlanda vojaĝo ne povos plenumi mendojn dum junio-aŭgusto 1969.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de majo neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Aŭstralio: J. Richardson. **Belgujo:** Agnes Geelen. **Brazilo:** Milton Paulino dos Santos. **Britujo:** Mildred Wood. **Bulgarujo:** Georgi Sp. Atanasov, Elena Toteva Kovačeva, Nikola Kirilov Ivanov. **Ĉeĥoslovakujo:** Miloslav Šváb, Josef Skoumal, Adolf Staňura, Tibor Gaál. **Finnlando:** Reino Huttunen, T. M. Aurela, Martti Telaranta, Taisto Suontausta. **Germanujo:** Karl-Ernst Salzmänn. **Irlando:** John Murray. **Italujo:** Wando Lanzi. Dea Veronese Marchiori. **Jugoslavio:** Martin Sabolek, Horvat Ivica, Mustafa Resulović, Senad Ćolić, Branko Vokić. **Kanado:** Ken Price. **Kolombio:** Luis Eduardo Palacios Toral, María Luisa Rodríguez Juliao. **Usono:** Marion Bigelow, Paul S. Taylor.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Agnar, s-ro H., Usono.
Andersson, s-ro B., Svedujo.
LeCam, s-ro D., Usono.
Olsson, s-ro S., Svedujo.
Riisbjerg, f-ino G., Danlando.
Trelluyer, s-ro J. P., Francujo.
Wilson, s-ino J., Nov-Zelando.
Ziller, s-ro Richard R., Usono.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1969

66 d'Amorim, s-ro Nid Dutra; 67 de Araujo, f-ino I. Baggi; 68 Dionísio, s-ro C. H.; 69 Domingues, d-ro C.; 70 Franco, s-ro Luiz Carlos; 71 Pádua, s-ro Geraldo; 72 Pinto, s-ro José Dias; 73 Rezende, d-ro C.; 74 Santos, d-ro Hyzo Gondeberto dos; 75 Vaz, s-ro A. J.; 76 Verde, d-ro D. Lima, Brazilo. 77 Atkinson, s-ro G. B.; 78 Knight, s-ino E. B.; 79 Murray, s-ro R.; 80 Phelan, s-ro Herbert K.; 81 Sly, s-ro Kenneth A., Britujo. 82 Andresen, s-ro S.; 83 Hansen, s-ro E.; 84 Jahn, s-ro C. J.; 85 Kehlet, s-ro Torben; 86 Pedersen, s-ro J.; 87 Schröder, s-ro Olle; 88 Zacho, s-ino Birthe, Danlando. 89 Beau, s-ro Jean; 90 Pera, s-ro Jean, Francujo. 91 Gründler, s-ro Martin, Germanujo. 92 Waksman, s-ino Henia, Israelo. 93 Terrazzani, s-ino L. Sparado, Italujo. 94 Kovács, d-ro Kalman, Jugoslavio. 95 Coppens, s-ino A. B. M.; 96 Hoekma, s-ro A. G.; 97 Kat, s-ro F. H.; 98 Wekker, f-ino E. L., Nederlando. 99 Ringstad,

Oficiala informilo

s-ro G., Norvegujo. 100 Ahlin, s-ro E. V.; 101 Ahlström, f-ino M.; 102 Almén, s-ro P.; 103 Andersson, s-ro B.; 104 Andersson, s-ro Ivar; 105 Andrén, s-ino Ester, 106 Björklund, s-ro F.; 107 Brandemar, s-ro Nils; 108 Dahl, s-ro Einar; 109 Ek, s-ro Axel; 110 Emson, s-ino R.; 111 Enström, f-ino M. L.; 112 Fingalsson, s-ro B.; 113 Forslund, s-ro Yngve; 114 Frode, s-ro O.; 115 Gustafsson, s-ro K. E.; 116 Gustavsson, s-ro G.; 117 Johansson, f-ino E.; 118 Johansson, s-ro Erik; 119 Karlsson, s-ro Henrik; 120 Kjellgren, f-ino Jenny; 121 Lagerkrantz, s-ro L.; 122 Lidell, s-ro Ville; 123 Lindberg, s-ro E.; 124 Lindberg, s-ro F.; 125 Moberg, s-ro Karl J.; 126 Möllestad, s-ro Sven; 127 Pettersson, s-ro Folke; 128 Sedendahl, s-ro W.; 129 Svärd, s-ino Rut; 130 Tell, s-ro L.; 131 Turner, s-ro Fred; 132 Wedholm, s-ino Anna, Svedujo. 133 Beard, s-ro Ralph H.; 134 Belinfante, d-ro F. J.; 135 Bigelow, f-ino Marion E.; 136 Correa, s-ro Alfonso; 137 Dombrowski, d-ro J. A.; 138 Estling, s-ro Albert E.; 139 Ledeen, s-ro H.; 140 Ledeen, s-ino Pauline; 141 Neri, s-ro R. R.; 142 Palermo, s-ro V.; 143 Parkerson, s-ro J.; 144 Solzbacher, d-ro William; 145 Soverow, s-ro Frank; 146 Thomson, s-ro Ken, Usono.

FERIU EN JUGOSLAVIO



INTERNACIA ESPERANTA FERIO-CENTRO VOLPARIJA — JUGOSLAVIO

IEFC situas meze de pina arbareto, sur la okcidenta marbordo de la duoninsulo ISTRIO, kun milda mediteranea klimato kaj vegetaĵaro, kio prezentas al la gastoj agrablan kaj trankvilan ripozon. IEFK disponas pri tri vilaoj kun entute 150 litoj en 2-3-litaj ĉambroj. Propra strando kun cementita plato por sunumado. Bansezono: De la 15-a de majo ĝis la fino de septembro.

La administranto kaj kelneraro parolas Esperanton!

Ekzistas eblecoj por ekskursoj al Portoroĝ, Koper, Postojna (mondfamaj grotoj), Lápica (mondfama ĉevalbredaĵo), Poreč, Pula, al proksima Italujo ktp.

Kompleta pensio: De 2,60 ĝis 3,60 US dol. aŭ egalvaloro. Por grupoj specialaj kondiĉoj! Postulu senpagajn prospektojn!

IEFC de Esperanta societo, Ljubljana,
P.f. 401 — Jugoslavio

DONACOJ (Gld.)

Fondaĵo Canuto (Por membrigi personojn en landoj kun transpagaj problemoj): Britujo: Bartošik, s-ro K., 1 MA; Rytjkov, s-ro Nicolai, 1 MA; Holmes, s-ro H. W., 1 MA. Nederlando: Kat, s-ro F. H., 1 MA. Svedujo: Waldén, f-ino Klara, 1 MA.

Fondaĵo Enciklopedio de Esperanto: Svedujo: Bohman, f-ino Magda, 210,—.

Generala Kaso: Nederlando: Kat, s-ro F. H., 12,50; Postma, f-ino Tj., 20,00. Nov-Zelando: Swift, s-ro F., 5,20.

Internacia Arta Teatro: Belgujo: Meurrens, s-ino A., 2,75.

Patrono A de TEJO: Germanujo: Kotyrba, s-ro Wolfgang. Svedujo: Möllestad, s-ro Sven. Usono: Lewis, f-ino Ellen.

Por TEJO: Slot-van der Meulen, s-ino A. M., 50,00.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

Universala Esperanto-Asocio

INTERNACIAJ KONKURSOJ 1969

Stato je la 28-a de februaro 1969

Konkurso I

Pozicio	Lando	kvoto	poentoj	%
1	(1) Finnlando	2401	2455	102,24
2	(2) Usono	4022	3005	74,71
3	(14) Italujo	3737	2740	73,32
4	(3) Scislando	1775	1255	70,70
5	(4) Britujo	5835	3815	65,38
6	(7) Svedujo	6192	3660	59,11
7	(6) Danlando	2648	1525	57,59
8	(5) Germanujo	6257	3530	56,42
9	(10) Francujo	6887	3742	54,33
10	(8) Japanujo	3837	1890	49,26
11	(11) Nederlando	5110	2485	48,63
12	(13) Hispanujo	2879	1355	47,06
13	(9) Jugoslavio	3643	1650	45,29
14	(13) Brazilo	2950	1203	40,78
15	(15) Belgujo	1836	105	5,72

Konkurso II

1	(2) Nov-Zelando	1171	1012	86,42
2	(11) Israelo	524	415	79,20
3	(1) Aŭstralio	1275	921	72,24
4	(3) Kanado	1003	620	61,81
5	(4) Aŭstrujo	1231	545	44,27
6	(5) Norvegujo	1343	555	41,32
7	(6) Sudafriko	250	90	36,00
8	(7) Madagaskaro	250	80	32,00
9	(10) Grekujo	288	70	24,31
10	(8) Argentino	650	120	18,46
11	(9) Islando	250	30	12,00

La Internaciajn Konkursojn partoprenas tiuj landoj, el kiuj oni povas libere aliĝi al UEA. Poentoj estas aljuĝataj laŭ nombro de membroj, jene: AM = 1; MJ kaj J-MJ = 5; MA, MA-K kaj J-MA = 10; MS = 15; Patrono kaj DM = 50. La kvoto estas la meza poentaro atingita en la lastaj 5 jaroj. Interkrampaj ciferoj indikas la pasintmonatajn poziciojn. Laŭ la rezultoj je la 31-a de decembro la kotizperanto de la venkinta lando en ĉiu el la du konkursoj ricevas je sia dispono libropremion de 100 gld.

ANONCETOJ



Tarifo: po 0,25 gld. por ĉiu vorto. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.

◀ **Gesamideanoj en Afriko**, mi deziras korespondi kun vi, ĉar mi rondvojaĝos 1970 tra Afriko kaj prezentos lumbildojn. Skribu al s-ro Adalbert Masuhr, D-2200 Elmshorn, Hainholz 43, F. R. Germanujo.

Venu al belega. marborda urbo de sudorienta Anglujo por viaj ferioj. Skribu al: S-ino V. Bateman, "Croft House", The Croft, Hastings, Sussex, Anglujo.

Ĉu vi estas laca? Ĉu vi dormas malbone? Ĉu viaj haroj forfalas aŭ perdas sian tonon? Provu "Biolife" unika natura vegetala nutraĵo. Unumonata provizo kostas nur 10 ŝilingojn (20 stelojn) plus afrankon (3 stelojn). Laŭdoj kaj mendoj por "Biolife" estas ricevataj ĉiun tagon de ĉiuj partoj de la mondo. Mendu de R. E. Plant Life (E) Market Hall, Farmers Avenue, Norwich, Britujo.

Antaŭkongresaj ferioj en Danlando. Ekkonu danan filozofion kaj danan ferian vivon. Pasigu la antaŭkongresan semajnon (19.7 - 26.7.69) en la feria centro Kosmos en Danlando. Prelegoj kaj liberaj diskutoj pri esencaj demandoj de la vivo, i.a. pri esperanto-problemoj. Feriado en bela dana naturo apud la maro. Ekskursoj al vidindaĵoj kaj historiaj lokoj. Vizitoj en danaj feriaj hejmoj, kie floras intereso pri humanismaj kaj internaciaj demandoj. Petu senpagan broŝuron ĉe Martinus-Instituto, Esperanto-Sekcio, Mariendalsvej 94-96, DK 2000 Kopenhago F., Danlando.

Kun okcidentaj kaj ekstereŭropaj landoj volas korespondi, interŝanĝi pk, fotojn, prospektojn k.t.p. 24-jara agrikultura teknikisto. Interesiĝas pri geografio, ĝardenkulturo, sporto kaj aliaj temoj. Volontege kun agrikulturistoj. Stanislav Karés, Polst 47, p. Miletin, okr. Jicin, Ĉeĥoslovakujo.

Kongresanoj! Havigu bonegan helpilon en la kongreslanda lingvo: vortaron "Suomi-Esperanto-Suomi". La plej bela Esperanto-vortaro kaj vera "minigiganto": Formato 12 x 9 x 1,2 cm; pezo 115 g; 176 plus 204 paĝoj, kun po 15000 vortoj. Bona papero, klara preso, forta bindaĵo. Prezo kun sendo 25 steloj (monbilete aŭ per poŝtĉeko: Tu 60253). Mendojn akceptas: Ĉefdelegito, Somero 9, Finnlando.

Poŝtstampo oficiala dum jarkongreso sveda paske. Koverto (kun glumarkoj) 3 int. rpk. (2 sv. kr.) al M. Andreasson, S-420 11 Hisingskär, Svedujo. Glumarkoj: 1 kr. por 6; 2,50 por 30.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD, Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Sanĝo de adreso. Hispana Esperanto-Junulara Sekcio HEJS. Salvador Aragay, Str. Bassegoda, 40-3-1, Barcelona-14, Hispanujo.

Jorge Korio, Rua Costa Lobo, 177, Guanabara, Brazilo, deziras interŝanĝi p.k. kaj filozofiajn temojn.

Planteto, kvarkolora infana Esperanto-gazeto, aperas kvarfoje jare, ilustrita, kun internacia enhavo. Abonkotizo: US \$ 1,— (3,60 gld.). Adreso: Pispalanharju 13, Pispala, Finnlando.

Instruistino deziras korespondi tutmonde, precipe kun Svedujo. S-ino Angelova, 14b Ekzarh Josif, Pazarĝik, Bulgarujo.

Pensiita karbministo serĉas negermanajn samfakulojn, kiuj emas kritiki aŭ korekti karbministajn terminojn, antaŭ ol mi forsendos ilin al Esperanto Press, Ontario, Kanado por la Slipara Terminaro, skribu al: Wilhelm Renz, 46 Dortmund-Brackel, Brüchtenweg 11, Germanujo.

Ĉu vi deziras korespondi? en lingvoj Esperanto, franca, angla, germana, hispana. Sendu al nia mondklubo de korespondado informojn pri vi: adreso, aĝo, vizaĝ-foto, lingvoj parolataj, intereso, kiuj estos publikigitaj senpage en nia gazeto. Vi ricevos multegajn leterojn. Ni deziras ankaŭ kunlaborantojn. Klubo PARIS 2000, B.P. 379, PARIS (3e), Francujo.

Deziras korespondi s-ro Karl L. Sherwood (Peltisto), 2717 Curtis Dr., Amarillo, Tx. 79109, Usono. Aĝo 59. Pri hejmo, kutimoj, familio, nutraĵo, k.t.p. Interŝanĝos fotojn kaj korespondos per sonbendoj.

Trans la limoj akceptos Stokholma Rondo de KELI leterojn kaj poŝtkartojn por sia letervespero la 26-an de aprilo. Bonvolu sendi tuj viajn salutojn al: F-ino Siri Sjöstedt, Kungsklippan 11/II, S-112 25 Stockholm, Svedujo.

Memoru, ke s-ro P. Zacho, Åmosevej 5 A, Kopenhago 2700 Brh. daŭre akceptos ĉiaspecajn poŝtmarkojn por UEA. Ni petas vin konservi viajn uzitajn poŝtmarkojn kaj sendi ilin al la supra adreso. Tiel vi povas kontribui al financa fortikigo de UEA.

La Mevo, organo de la "Ornitologia Rondo Esperantlingva" estas la revuo por ĉiuj naturŝatantoj. Petu provekzempleron kontraŭ du respondkuponoj ĉe Luk Laga, Kerkstraat 26, Gullegem, Belgujo.

Se vi havas Esperanto-gazetojn de antaŭ la unua mondmilito, bv. skribu al mi. S-ro Ramon Molera, Sta. Joaquina, 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

KORESPONDEMULOJ !

Se vi publikigos korespondo-peton en nia revuo, kunsendu vian **FOTON**. Ĉiunmonate la redakcio elektos kelkajn fotojn de korespondantoj-anoncantoj por **SENPAGA** aperigo apud la koncernaj pagitaj anoncetoj! Kaptu la okazon!

En 1969 aperos

LA NOBLA KORANO

eble la plej grava verko de la monda literaturo, kiu ĝis nun mankis en la Internacia Lingvo. Aperos paralele la tekstoj araba kaj Esperanta. El la araba originalo tradukis d-ro Italo Chiussi.

Kontrolis i.a. prof. G. Waringhien
600 paĝoj plus antaŭparolo.

La verko aperos en la prestiĝa serio

ORIENTO-OKCIDENTO

sub aŭspicio de UEA.

Bindo: ledeca plasto, kun ora surpriso.

Prezo: 20 gld.

Petu faldfolion ĉe UEA.

ANONCO EN "ESPERANTO"

atingas pli da legantoj en pli da landoj, ol anonco en kiu ajn alia Esperanta revuo. Tarifo: tutpaĝa anonco = 285,- gld.; 1/2-paĝa = 150 gld.; 1/4-paĝa = 85,- gld.; 1/8-paĝa = 50 gld.; 1/16-paĝa = 35,- gld. Kliŝokostoj estas ekstreme kalkulataj. Rabato por senŝanĝa ripeto: 20 %. Oni bv. adresi anonco-mendojn al la Centra Oficejo de UEA.


DELEGITOJ !

Se vi transloĝiĝos al alia urbo, via delegiteco aŭtomate ĉesos.

Se vi tamen deziras delegitiĝi en la nova loĝloko, petu novan delegit-respondilon de via Landa Asocio (se ĝi aliĝis al UEA) aŭ de la Ĉef-delegito aŭ peranto (se tia persono ekzistas en via lando) aŭ (se ekzistas nek Landa Asocio nek Ĉef-delegito aŭ peranto) rekte de la Centra Oficejo de UEA.

Helpu nian administradon! Antaŭdankon!

Verko de Georges FRADIER
tradikita de C.D.A. CAPP
eldonita de U.E.A. kun
helpo de UNESKO



ORIENTO KAJ OKCIDENTO

1,50 gld.
50 paĝoj

Ilustraĵo el "Oriento kaj Okcidento"
(Foto: UNESKO - Marc Riboud).

Jen la valora verko...

elegante bindita

MEMORLIBRO

Eldonita okaze de la
100-jara datreveno de
la naskiĝo de

D-ro L. L. ZAMENHOF

De la naskiĝo de Zamenhof ĝis la apero de Esperanto en UNESKO ampleksas elstaraj artikoloj, skribitaj el la vidkampoj de la lingvistiko, literaturo, scienco kaj de la movado.

Kelkaj el ili tuŝas pri la estonteco.
Dekoj da fotomaterialoj.

Utiligu en via klubo
ankaŭ la **foton** de Zamenhof,
nefiksite enmetitan en la libron.
Ĝia formato: 21 x 26 cm.

Eldonis CED.

Grandformata: 22,5 x 29 cm.

Prezo: 12,50 gld.

Mendu ĉe UEA

HELSINGÖR

La internaciaj feriaj Esp-kursoj de Helsingör okazos 20.-26. de julio 1969 en La internacia Altlernejo (tute modernigita). Venu al Danlando por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis, Ingemannsvej 9
DK-8230 Åbyhøj, Danlando.

NB. Aŭtunaj feriaj Esp-kursoj okazos en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Århus, Danlando, 19.-25. de okt.

Programo jam havebla ĉe L. Friis.

Burleska — maldeca — satira

LA SKURILA LIBRO

Amuza mikspoto da legindaĵoj por ĉiaj gustoj verkita en Esperanto de

Adolf Sproeck

100 paĝoj kun plurkolora plasta kovrilo.

Prezo 6,— gld. aŭ 13,— danaj kronoj

ĉe Libroservo de UEA aŭ ĉe la eldonejo

Torben Kehlet, Ystadvej 11, DK-2850 Naerum.

Ĝirkonto Danlando 7 95 58.




URĜA ALVOKO

La INSTITUTO POR ESPERANTO EN KOMERCO KAJ INDUSTRIO (EKI), Postbus 412, EINDHOVEN, (Nederlando) jam dum kelkaj jaroj okupiĝas pri la verkado de deklingva difina vortaro en la regiono de komerco, industrio kaj ekonomio. La verko kompreneble enhavos ankaŭ esperantlingvan sektion. La laboro nun estas en sia lasta stadio; jam okazis intertraktoj kun eldonisto, sed ankoraŭ mankas al ni regula kunlaborado por la RUSA sekcio.

KIU FAKSPERTA ESPERANTISTO EN AŬ EKSTER RUSUJO PRETAS KUNLABORI PLEJEBLE BALDAŬ ? !

Sinproponojn oni direktu al la ĉi-supra adreso de EKI.



Universala Esperanta Stenografio.
Lernolibro por instrui sin mem
aperis sub la aŭspicioj de UEA kaj
de EKI.

(prezo: gld. 17.75 = 71 steloj).

Mondo, Rothstr. 7, CH-8057 Zürich.

Donacu libro-kartojn !

En multaj landoj ekzistas la bona kutimo donaci libro-karton aŭ libro-kuponon al siaj amikoj. La donacanto pagas iun sumon da mono al libro-vendejo kaj ricevas interŝanĝe specialan karton je tiu sama valoro. La karton li tiam sendas kun salutoj aŭ bondeziroj al iu amiko aŭ parenco. Tiu lasta, siavice, povas uzi la karton por aĉeti libron laŭ sia propra gusto kaj elekto.

Ankaŭ por Esperantaj libroj tiu metodo estas uzebla. Jam aperis specialaj, elegante presitaj donaco-kartoj je valoro de po 5,— guldenoj (20 steloj). La kartojn oni povas aĉeti kaj uzi ĉe la Libroservo de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando). Oni pagas nur la efektivan valoron (5,— gld.) plus sendokostoj (10%). La kartoj havas la oportunan formaton A6 (105 x 148 mm).

Ĉu vi foje cerbumis, kian donacon sendi al via korespond-amiko eksterlanda? Kiel scii, kion li jam posedas, aŭ kiujn librojn li jam legis? La donaco-karto de UEA solvas tiun problemon! Via amiko povos mem elekti el mil diversaj eblecoj: libron, diskon, gazetabonon aŭ ion ajn mendeblan ĉe la Libroservo de UEA, ĝis la valoro de 5,— gld. (aŭ pluroble 5,— gld., se vi sendos plurajn kartojn).